EKO 2022
Esperiga Komuniko
Subtene al la regiona, landa kaj loka agado
UEA
ILEI
IF EF
Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, Elda Doerfler

**ENHAVO n-ro 28>** ● EKO aktuala ● Hungario ● La araba ● AMO plu **< majo 16**

## Arĥivo de EKO ĝisdatigita

Ni ĝoje anoncas, ke la arĥivo de EKO por 2022 estas ĝisdatigita ĝis inkluzive numero 25 de 2022. Trovu ilin en la retejo de UEA <aktivulo.net> ĉe la subtemo <Agadaj Raportoj>. Tie vi trovas la kolektojn ĉiujare kaj laŭjare depost 2013. La alfabeta indekso por 2022 estas pretigita jam same ĝis numero 25, kaj estas petebla de SMG (nepeza PDF, 4-paĝa). Jen trezoro por historiistoj, ĉar la komunikoj ĉiam emfazis la lokan, landan, fakan kaj regionan agadon. Lokoj, kiujn ne tiom atingas la aliaj! La indeksado nepras por ebligi la rapidan trovon de difinitaj informoj.

## Bonega intervjuo en Hungario

Jen la traduko de bonega ĵurnala artikolo kiu rezultis el intervjuo kun la ĝisnuna prezidanto de Hungaria Esperanto-Asocio, s-ro István Szabolcs. La aŭtoro de la artikolo, Balint Orsolya, estas ĵurnalisto de la koncerna eldonaĵo.

La originalo estis evidente en la hungara, sed ni ricevis bonegan tradukon.

https://esperantohea.hu/wp-content/uploads/2022/05/Esperante-oni-povas-nur-ami_artikolo-en-Nepszava.pdf

*Népszava* (Popolvoĉo) estas unu el la ĉefaj ĵurnaloj en Hungario, kun meze preskvanto de 20,000 ekzempleroj. Jen pri la ĵurnalo en Esperanto, el Vikipedio: https://eo.wikipedia.org/wiki/N%C3%A9pszava

Komentas Renato Corsetti:
“Per tio Istvan Szabolcs eniras la rondon de la plej honorindaj membroj de UEA, la ‘agantaj membroj’, pri kiuj almenaŭ *La Ondo de Esperanto* devus interesiĝi.

## La araba Eo-kurso en la Jutuba kanalo de ILEI

لإســــبرانتو فــــي اللغـــــة العربيــــةالــدرس الأول مـن دورة لغـة ا

La prezentanto estas Taled Bilal Orabi el; Sirio.

Kiu kuraĝas aserti plu, ke ILEI ne ege aktive kreas kursojn?
La bazo estas la kurso de Tibor Sekelj.

Alessandra Madella, estrarano de ILEI.

## 33-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo



Ni invitas Vin partopreni la tradician aranĝon de la krakova esperantistaro, kun abunda prelega kaj arta programo kaj ekskurso dimanĉe, kiu okazos dum la tagoj 3a ĝis 5a de junio 2022. Vi trovos detalojn, inkl. aliĝilon, provizoran programon, informon pri tranoktebleco ĉe https://eventaservo.org/e/e21820. Bonvolu sciigi viajn geamikojn pri la aranĝo.

Magdalena Tatara, sekciestro de ILEI en Pollando.

## AMO ĝis la jaro-jaro-fin'

Jam okazis AMO-seminarioj 82 ĝis 85, unu en nova lando: Israelo. Iĝas ĉiam malpli facile aldoni novajn landojn, sed en 2022 tio rekorde okazos.

Jen kiom ni povas raporti pri la programo tra la sekvaj monatoj.

**AMO 86** en Sidneo, Aŭstralio, en la 12a de junio. Plia nova lando por la AMO-programo. Proponita temo: ''Esperanto por peri Oceaniajn Kulturojn'. Jam unu ero el Nov-Zelando estas. Plore, el la kvin personoj kontaktitaj dufoje, ne venis respondo.

**AMO 87** en Klaipeda, Litovio, iam inter la 9a kaj 17a de julio, kadre de BET. Plia nova lando por la AMO-programo. Akceptita temo: 'Baltio en Eŭropa Kunteksto'. Aparte aktuala en la nuna malpaco en la kontinento. Hibrida seminario.

**AMO 88** en Jelena Góra, suda Pollando, en julio 25a kaj 26a, en unu el la universitatoj. La seminario okazos lige kun la Kantkonkurso en Vroclavo. Temo certa: '135 jaroj da Esperanto – homoj, ideoj kaj okazintaĵoj'. Dua temo estas sub esploro. La loko: https://eo.wikipedia.org/wiki/Jelenia_G%C3%B3ra.




**AMO 89** okazos kadre de la 55a Kongreso de ILEI en Kebekio, Kanado, komence de aŭgusto. Temo: anonconta - io eduka, verŝajne pri universitata kunlaboro, kiu vere progresis en lastaj monatoj.

**AMO 90** okazos lige kun la Universala Kongreso en Montrealo, Kanado. Temo: 'Kulturaj trezoroj ekster Eŭropo' kun la celo altiri ekzemplojn de indiĝenaj popoloj. Precizaj datoj anoncotaj, sed inter la 7a kaj 13a de aŭgusto. La AMO-temo rilatas al la temo de la UK: 'Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj'.

**AMO 91** okazos en Brescia, Italio, kadre de la Itala Kongreso. Temo: 'Sociaj retejoj – kiel starigi kaj prizorgi ilin'. Gvidos Debora Rosseti. Aŭg 22, 23, 25, 26 (ĉiumatene inter 10:30 kaj 12:15 CEST). Hibrida seminaro.

**AMO 92** okazos en Togolando, sub prizorgo de ACE, fine de aŭgusto aŭ komenco de septembro. Celata estas hibrida seminario kun la temo 'Esperanto kaj trejn-flegado afrika'.

**AMO 93** okazos kunlabore kun nia komerca faka asocio IKEF. Plejparte virtuala kun organizado el Japanio en dimanĉo la 25a de septembro. Temo: Eŭrazia Ekonomia Komunumo (EEK).

**AMO 94** bonvenigas novan partneron: ELF-AREK. Ĉeforganizas Triesta E-Asocio kunlabore kun ELF/AREK (Esperanto-Ligo Filatelista - Amika Rondo de Esperantaĵ-Kolektantoj). La aranĝo estas antaŭvidita hibride, ĉar i.a. unu "brako" de ELF/AREK estas en Brazilo. La temo traktos pri kolektado kaj konservado de Eo-aĵoj.

**AMO 95** okazos en Kroatio en novembro kadre de ĉiujara aranĝo.

**AMO 96** okazos en Tieso, Senegalo, decembre, kadre de la 8a Afrika Kongreso. Temo: 'Interafrika kunlaboro'. Senegalo estas nova lando por la AMO-programo. Legu pli sube.

## La lasta AMO de 2022

La plej granda utilo de Esperanto sendube estas, ke ĝi ebligas interagojn inter homoj de malsamaj kulturaj fonoj kaj landoj. La AMO-seminario enkadre de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto (AKE) per la ĉeftemo 'Interafrika Kunlaborado' celas pliriĉigi la diskuton pri la interagoj inter esperantistoj je pliaj dimensioj kaj aparte je tiuj de Afriko. Ĝuste ni kundividos niajn agadojn kaj ekzistantajn kunagad-eblojn unuj kun la aliaj, ekscios pri agadprojektoj de asocioj, unuopuloj kaj de kontinentaj komisionoj de UEA, sed samtempe ni ekkreos novajn agadperspektivojn kaj ankaŭ cerbumos pri procezoj per kiuj ni povos unuavice inter afrikanoj kunlabori pli efike. La ideo estas, ke ĉe la fino ni povu surbaze de niaj prioritatoj kaj krekapabloj forĝi konkretajn iniciatojn, kiujn ni povos metode kaj kunlabore inter ni plenumi, cele al prospera enkontinenta movado. Mallonge, dum la tuta AMO-periodo en Senegalo ni per prelegoj, diskutrondoj, trejnadoj kaj aliaj aktivaĵoj esploros la seminarian ĉeftemon.

Unu el la interesaj ebloj, kiujn proponas la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto estas okazo por la partoprenontoj ekscii pri la volofa lingvo. Dum la kongresa semajno en Tieso, en Senegalo, decembre 2022 okazos ankaŭ kurso pri la loka lingvo volofo.

Se vi emus eklerni la volofan aŭ ekkompreni kiel ĝi funkcias, aliĝu kaj venu al la 8-a AKE! Vi krome ĝuos veran senegalan etoson en la afrika Esperantujo, ankaŭ admiros interesan landon kaj ĝian belecon! Pliaj informoj pri la kongresaj pretiglaboroj legeblas ĉe https://afrika.esperantujo.io/8-ake/senegalo.

Adjévi Adjé, Membro de la Kongresa Organiza Komitato

## Kurso en Kostariko repetita en universitato

Pasintlunde mi partoprenis la sesion de la kunpensigado. Tie oni demandis min, kiam mi denove instruos Esperanton en la Universitato de Kostariko. Tiam mi diris ke mi instruas tiun kurson ĉiun duan aŭ trian jaron kaj ke lastfoje mi instruis ĝin pasintjare. Sed la hazardo volis ke ĉio okazu alimaniere.



Ĉi-posttagmeze mi ricevis telefonvokon de la fakestrino pri lingvistiko, kiu diris al mi ke en la kurso de 2021 estis multaj gestudentoj, kiuj ne povis partopreni la kurson. La kialo estas ke ni havas limon de 25 gestudentoj por tiu kurso (averaĝa limo). Sed laŭ la raporto de prizorgantoj de nia aŭtomata sistemo de enskribiĝo estis 75 homoj, kies peto por enskribiĝo ne estis akceptita. Do, tio signifas ke entute 100 homoj interesiĝis pri Esperanto pasintjare, sed nur la 25 gestudentoj kun pli altaj rezultoj en ekzamenoj sukcesis esti akceptitaj (mi rimarkis ke la averaĝa noto estis preskaŭ la maksimuma en la klaso). Sekve, mi

instruos denove Esperanton ekde la mezo de aŭgusto laŭ peto de la fakestrino pri lingvistiko.

Antonio Leoni.

## Norda vento (duonoficiala himno de Kantabrio)

Tio sonis en Esperanto, ĉe la inaŭguro de la 80a Hispana Kongreso de Esperanto en Comillas: https://youtu.be/Js6CFfPmcrs

mga

## Universitataj paradigmoj

La dua renkontiĝo de Esperanto-Paradigmo okazos ĉe la Universitato Bonn de la 6-a ĝis la 8-a de septembro 2022. Bonvenaj estas proponoj de magistraj studentoj, doktoriĝantoj kaj post-doktoroj. Elektotaj partoprenantoj ricevos repagon de vojaĝo kaj restadkostoj. La laborlingvoj estos franca, germana kaj angla. Ĉi-kune vi trovos la detalan priskribon en la germana kaj franca lingvoj.

Esperanto-paradigmo estas serio de universitataj atelieroj kiuj celas renkontigi esperanto-esploristojn kun fakuloj de afinaj temoj kaj alproksimigi master-studentojn kaj doktorantojn al esperantorilata temaro. Ĝin kunordigas Martin Aust (Universitato Bonn), Pascal Dubourg Glatigny (CNRS-EHESS), Denis Eckert (Centre Marc Bloch Berlino) kaj Bernhard Struck (University of St. Andrews). Ĝin financas la franc-germana universitato (DFH-UFA). La venontjara renkontiĝo okazos en 2023 ĉe Campus Condorcet en Parizo.

Pascal Dubourg Glatigny

## Nevelsteen en Vikipedio

Mi prelegis pri Vikipedio en marto; oni registris tion.

Eble vi volas spekti https://youtu.be/77eKIfgw7EM

Yves Nevelsteen, Belgio

========= vortoj: 1310 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de majo 2022** (per EKO 2022-25). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2013.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.